

Esperanto en Ĉeĥoslovakio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.07.25 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. En nia leterkesto kuŝas tre interesa letero de Jiri PATERA en Praha, Ĉeĥoslavio. Hodiaŭ ni ne nur dankas al nia ĉeĥa aŭskultanto pro tiu mesaĝo verkita la 27-an de februaro. Ni ankaŭ legos erojn el ĝi, ĉar tiu letero alportas informojn citindajn pri la nuna situacio en Ĉeĥoslovakio.

A.- Jiri PATERA komencas sian leteron dirante:

Cl.- "Nun mi eble havos iom pli da tempo. Mi ĉesis redakti "Starton", la gazeton de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, do mi povos iom pli ofte skribi al vi...

A.- Ni antaŭĝojas pri la ricevo de tiuj leteroj kaj nun ni citu, kion li diras pri ŝanĝoj kadre de Ĉeĥa Esperanto-Asocio:

Cl.- Komence de decembro, pasintjare, okazis en Trebič la 6-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en kiu estis akceptita nova statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj elektita nova estraro; anstataŭ la ĝistiam centra komitato pli ol 20-membra laboras nun konsilantaro, kiu havas nur 7 membrojn. La prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio restis d-ro Chrdle... La kongresoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazos ĉiun trian jaron, sed ĉiujare estos konferencoj de lokaj delegitoj...

A.- Jiri PATERA donas sian personan impreson pri la okazinta revolucio:

Cl.- "Jam pli ol unu jaron regas en nia lando nova politika sistemo - cetere kiel ankaŭ en la aliaj landoj de la iama orienta bloko - kaj mi tre ĝojas pro tio. Fakte komence mi ne volis kredi, ke la ŝanĝo estas ebla, ĉar la tiamaj regantoj estis certaj pri sia pozicio, ke eĉ mi kredis, ke la ŝanĝo povos veni nur komence de la venonta jarmilo. Kaj jen - venis la 17-a de novembro 1989-a kaj la renverso efektiviĝis. Mi ĉiam pinčas min ĉeokaze kaj konvinkas min, ke tio estas realaĵo, ne sonĝo. Kaj mi rememoras ĉiam pri miaj gepatroj, pri parencoj kaj amikoj, kiuj neĝisvivis tiun momenton. Mia patro ĉiam revis pri la falo de komunismo...

A.- Poste Jiri PATERA parolas pri la ekonomia krizo, kiun travivas lia lando:

Cl.- "Sed la ĝojo havas ankaŭ alian flankon, la ekonomian. La ekonomia stato de Ĉeĥoslovakio ne estis bona, ni staris jam super abismo, kaj sekve estas nun necese fari gravajn ŝanĝojn. Oni ĉiam diskutas pri ekonomiaj reformoj, sed la disvolviĝo de la reformo progresas malrapide. Dume jam altiĝis prezoj, ĉefe de nutraĵoj, ankaŭ de gazetoj, libroj kaj de multaj aliaj artikloj, ankaŭ de fervojoj, aŭtobusoj (mi komprenas vojaĝkostojn), poŝtafrankoj kaj ni atendas gravan altigon de lu-pagoj. Nu kaj estos ŝanĝoj en la industrio kaj agrikulturo kaj en aliaj branĉoj de la ekonomio, ni atendas grandan senlaborecon antaŭ ol la ekonomio de la lando resaniĝos kaj komencos levi la bonstaton de la lando kaj de la loĝantaro. Mi scias, ke tio daŭros multajn jarojn.

A.- Jiri PATERA poste raportas pri la situacio de la esperanto-movado en tiu ekonomia krizo:

Cl.- "La ekonomiaj malfacilaĵoj trafis ankaŭ la Esperanto-movadon en nia lando. Ni jam scias, ke ni ne povos organizi la Umversalan Kongreson en 1992-a, ĉar ni ne scias, kiaj tiam estos la

prezoj, pli bone dirite je kiom ili estos pli altaj ol nun... Cetere Ĉeĥa Esperanto-Asocio havas financajn problemojn kun siaj du ĉambretoj en Ĵilska-strato, ĉar la lupago konsiderinde altiĝis en la centro de Prago, ke oni intencas unu ĉambron luigi al iu turisma oficejo por gajni de ili monon por pagi la propran ĉambron. La samo trafis ankaŭ la Pragan Klubon, kiu havas siajn ĉambrojn post la angulo, en Vejvodova strato. La klubkunvenoj okazis en Kodanska strato, en sufiĉe vasta ejo, sed tie nun estas renovigata la originala privata restoracio, tial la klubkunvenoj estas nun en la "propraj ĉambroj" en Vejvodova strato. Cetere por la vesperoj ne venas pli ol dudek membroj, tial la ĉambroj estas sufiĉaj. Posttagmeze okazas tie kursoj, dum aliaj tagoj kunvenoj de junularo kaj similaj. Tamen la pasintjaraj kursoj estis magraj pro granda interesiĝo pri la angla kaj germana lingvoj, tial al Esperanto aliĝis ĉi-foje nur malmultaj, kio rezultigis malgrandajn enspezojn en la kluban kason. Kaj nun la altiĝo de la pago por la ĉambroj estas tiom granda, ke la klubo povas pagi nur la ĉi-jaran unuan jarkvaronon kaj poste devos la ĉambrojn forlasi. Nu bone, ni povas kunveni aliloke, sed kien meti la faman "Esperanto-bibliotekon de Prago", kiu dume kuŝas en la alia ĉambro.

A.- Ni timas, ke pro tiuj financaj problemoj perdiĝos valoraj. Ni scias, ke ankaŭ en Pollando la esperanto-biblioteko estas minacata pro la altiĝo de la luprezio de la loĝejo, kiun okupis en la centro de Varsovio Pola Esperanto-Asocio. Okcidentaj landoj trovis solvon donancante siajn arkivaĵojn al publikaj bibliotekoj. Ĉiuj konas la riĉegan Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, ni ofte raportas pri Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Internacia Lingvo (CDELI) kiu estas fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. En Germanio la Biblioteko de la Urbo Aalen fariĝis la sidejo de la esperanto-biblioteko de Germana Esperanto-Asocio, en Francio la esperanto-arkivaĵoj troviĝas en la urbo Gray en Franca Esperanto-Muzeo. Povu troviĝi similaj solvoj por la esperanto-bibliotekoj en la orienteŭropaj landoj. Sed ni revenu al la letero de Jiri PATERA:

Cl.- ... Ne renoviĝis la esperanto-elsendoj de la Ĉeĥoslovaka Radio, kvankam komence om promesis, ke estos rebonigitaj ĉiuj eraroj kaj mispaŝoj de komunistoj, inter ili la nuligo de la iamaj florantaj esperanto-lingvaj dissendoj en la radio. Bedaŭrinde la financaj problemoj kaj krome ankaŭ la "kompetentecaj" disputoj pri tio, ĉu ekzistu Ĉeĥoslovaka Radio, aŭ nur la Ĉeĥa Radio kaj la Slovaka Radio kaŭzas, ke multaj problemoj ne estas solvitaj kaj ĉiujn diskutojn oni emas forŝovi por la posta tempo.

A.- Pri la prestiĝo mem de esperanto Jiri PATERA diras tion ĉi:

Cl.- "Komence de la pasinta jaro, en la ĝoja postrevolucia etoso, kiam ni ankoraŭ esperis, ke la Universala Kongreso okazos en Prago, la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio turnis sin al la prezidento de la respubliko kaj petis lin transpreni la honoran patronecon de la kongreso. Kiam la respondo ne venis, li urĝigis ĝin kaj post kelkaj urĝigoj kaj post longa atendado fine venis nea respondo de la prezidento. Nur tiam ni ekkomprenis, ke sinjoro Havel estas amiko kaj propagandanto de la angla lingvo kaj kontraŭulo de artefaritaj lingvoj. Ankaŭ en siaj verkoj li esprimis similan opinion. Ekzemple en la satira teatraĵo "Memorando" li uzas artefaritan lingvon 'ptydepe' por moki la komunistan burokrataron kaj unu el la rolantoj tiam diras:

A.- "For la artefaritajn lingvojn!

Cl.- Jiri PATERA plue skribas: Ankaŭ en sia eseo "Politiko kaj konscienco" - kiu laŭdire estas tradukita en multajn lingvojn - s-ro Havel nomas artefaritajn lingvojn kune kun ideologioj, sistemoj, aparatoj, burokratioj kaj politikaj sloganoj la ĉefaj aferoj, kontraŭ kiuj ni devas oponi. Laŭ li tio apartenas al la artefarita mondo, kiu esence diferencas disde la "natura"

mondo, kiun li estimas kaj alte aprezas laŭ sia filozofia vidpunkto... Artefarita lingvo ne apartenas al ŝatataj aferoj de nia prezidento. Sed pasintjare ni tion ankoraŭ ne plene konsciis...

A.- Pri la estonteco de esperanto Jiri PATERA tamen konservas optimismon:

Cl.- ...La nunaj liberaj eblecoj vojaĝi eksterlanden pozitive influos la movadon, ankaŭ libera aĉeto de okcidentaj libroj, abono de gazetoj ktp. helpos al plivigligo de nia movado. Cetere en la iom bulvarda tagmeza ĵurnalo "Ĉeĥa Ekspreso" aperas nun mallonga ĉiutaga kurso de Esperanto. Post similaj kursoj de la angla kaj germana lingvoj la redakcio serĉis iun malgrandan lingvon, ne tro konatan, kaj decidis sin por Esperanto, do temis pri neesperanta iniciato. La kurso ... havos 60 lecionojn kaj aperos dum 3 monatoj. Mi ne scias, ĉu iu laŭ ĝi ellernos Esperanton, sed iaspecan propagandan signifon ĝi certe havos.

A.- Ni dankas ai Jiri PATERA pro tiuj novaĵoj, kiujn ni ne volis konservi nur por ni.

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia salutas Claude kaj Andrée GACOND: Ĝis la reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012